



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 9/10  
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
32-a (37-a) jaro  
Monata

## *Esperanto kaj UNESKO*

La sveda parlamento printempe en 1965 admonis sian registaron turni sin al UN aŭ UNESKO (prefere al la lasta) por ke unu el ili starigu komisionon por objektivite studi la demandon pri internacia lingvo. (En la mocioj de la parlamento Esperanto okupis vastan lokon.) La sveda registaro komisiis al la sveda U.-komisiono (U. = UNESKO) persekuti la aferon. Ĉi tiu decidis prezenti la proponon al la ĝenerala direktoro de U. en Parizo. Sed antaŭe ĝi deziris atingi ke la propono estu tut-norda, kaj la Nordlandaj U.-komisionoj kunvenis en Finnlando fine de majo (1965) kaj traktis la proponon. La finnoj tuj poste konsentis, sed la danoj kaj norvegoj hezitis. 2-foje la Norvega U.-komisiono decidis rifuzi. Tamen: dum nova tut-norda U.-kunveno en junio 1966 en Reykjavik la svedoj kaj finnoj sukcesis persvadi la aliajn subteni la

proponon, la norvegojn tamen nur kondiĉe ke ĝia lasta frazo: «kaj se montriĝos praktike, fari proponon pri la enkonduko de tia lingvo» estu forstrekita. Por savi la nordan unuecon la ceteraj aprobis la rezervon. La ĝeneral-konferenco de U. en Parizo startis la 25/10, kaj la propono estas sur la tagordo. S.ro Malmgren, honora prez. de UEA, kiu gvidis nian agadon en Svedlando (kune kun parlamentano Einar Dahl), iris Parizon por asisti la svedan delegacion. (S.ro M. ja efektivigis internacian enketon pri la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj de la unuopaj landoj (nombroj da instruhoroj postulataj), prezentitan al la Sveda U.-komisiono. En nia lando instruistino Astrid Mansrud respondis je la enketo.

R. Bugge-Paŭlsen





**Mi opinias . .**

**Pensoj de la legantoj**

«Ĉu Esperanto estas ĵazbaleto?»

Dum la preparo por la novaj esperantokursoj por komencantoj en Oslo okazis jena telefona interparolo:

Virino al mia edzino: «Mi legis en la gazetoj pri la kursoj en Esperanto, sed diru al mi, kio estas Esperanto?» Mia edzino respondis iom surprizigante: «Ĉu vi vere ne scias kio estas Esperanto?» «Ne,» diris la fremdulino, «— ĉu Esperanto estas ia ĵazbaleto?» (!)

Mi rakontis la historion en kluba kunveno kaj multaj el la ĉeestantoj ekridis. Sed mi diris al ili ke ili ne ridu, sed ploru kiel mi mem preskaŭ estis faranta aŭdante la historion de mia edzino.

La nuda vero ja estas ke tio pravas ke bedaŭrinde troviĝas homoj — eĉ plenkreskuloj — en la ĉefurbo de Norvegujo kiu kredas ke Esperanto estas iaspeca danco, ĵazbaleto, tute

**Esperanto en la norvega radio**

Lundon la 28-an de novembro 1966 je la 17.10—17.25 Norsk Rikskringkasting denove elsendis la radiointervjuon kun la prez. de Klubo Esperantista en Oslo, disponento John Berggreen, jam elsenditan 27/-1—66 (tiam je la 11.35—11.50). La manuskripto estas nun iomete aktualigita (nova sonbendo) kaj prezentigis precize en la 50-jara jubilea tago de la klubo (kvankam la klubo mem festos la jubileon sabaton 26/11).

nesciante ke ĝi estas internacia lingvo. Kaj la kulpa por tiu skandalo, mi diris al la klubanoj, estas unuavice mi kiel prezidanto de Klubo Esperantista en Oslo, kaj duaavice la propagandestro kaj cetere ĉiuj klubanoj, ĉar ni ne sukcesis informi la enloĝantojn de Oslo pri la internacia lingvo Esperanto.

Post tiu okazaĵo mi pripensis la aferon denove kaj ofte demandas min mem: «Kion ni povos fari kaj kiel ni devos labori por ke Esperanto estu sufiĉe bone konata inter ĉiuj homoj en Oslo kaj Norvegujo?» Kiu povas doni al mi bonan konsilon pri tio?

John Berggreen

**DONACIOJ AL LA KONTORFONDAĴO**

Th. Dybing	kr. 20,00
Signe Haug	» 45,00
C. S.—B.	» 100,00
O. Rygg	» 111,00
Harda Danielsen	» 226,50
R. Winsnes	» 20,00
R. Bugge-Paulsen	» 120,00
Per Vasmoen	» 300,00
K. Syversen	» 10,00
Eva-Britt Hansen	» 10,00
Julie Romsdal	» 10,00
Aa. Sletterød	» 10,00
Aslaug Refsing	» 180,00
A. Gjelstad	» 48,60
A. Armanis	» 10,00
K. S. K.	» 20,00
A. Somdalen	» 5,00
K. Paulsen	» 5,00
H. Friestad	» 10,00
F. Hole	» 50,00
Bj. Aandahl	» 10,00
Karen Berge	» 10,00
Kontribuo de Klubo Esperantista en Oslo	» 350,00
	<u>kr. 1681,10</u>

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

**Norvega Esperantisto**

**ESPERANTOBLADET**

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—  
1/8 p. kr. 19,—.

**Bondeziroj kaj dankoj**

Al ĉiuj legantoj, al niaj kunlaborantoj, verkantoj, raportantoj, al la kompostisto-presisto, al la ekspedisto, ni esprimas la plej korajn bondezirojn okaze de kristnasko kaj novjaro. Ni dankas ĉiun el vi pro la intereso, kiun vi montris, pro la laboro kiun vi faris, pro la bona volo. Kaj ni kuraĝas esperi, ke la baldaŭ komenciĝonta nova jaro estos pli fruktodona ol la ĝisnunaj jaroj, ke ĝi estos jaro ĉiam memorinda en la historio de Esperanto. Pro tio ni dankos vin post unu jaro!

**Sciigoj de N.E.L.**

Kursoj. Jam estas tempo plani la kursojn dum la venonta printempa sezono. Klubo, kiuj spite nian insistan alvokon, tamen ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniu progreso. Kaj ĉiuj kluboj devas progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I: kr. 23,00; parto II: kr. 25,—; ambaŭ partoj kune: kr. 42,—. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,—, kr. 19,—, kr. 32,—.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al NEL. Blanketojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por la kluboj. — Decembro: La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi la kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de UEA-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pri-traktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala

kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekr. sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (Bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raportojn pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

*La Liga Estraro.*

## MALLONGE

### Esperantista skiferio en Adelboden

- Svislando 26/12 1966 — 4/1 1967

*Adelboden* estas skistacio en Bernaj Alpoj, alta je 1400 m. — Por la deka fojo ni organizas skiferion, ĉar la pasintaj ĉiam majstre sukcesis.

AĜO: de la 16a jaro, kaj ĝis kiam oni ne plu sentas sin sportema!

PROGRAMO: skiado; glitŝuado; ekskursoj; vespera programo kun: interkona vespero, prelegoj, diskutoj kaj festoj... (alportu viajn diapozitivojn pri ŝatokupoj, vojaĝoj, diskojn, muzikilojn, ktp.)

ADRESOJ: por aliĝi skribu al s-ino  
Andrée Gacond, Miéville 133,  
2314 LA SAGNE (Svislando).

\*

### Internacia Rekontiĝo dum la foiro en Leipzig.

Esperantistoj vizitontaj la printempan foiron 1967, sabaton vespere, la 11-an de marto, havos okazon en Leipzig esti en rondo de esperantistoj. Pro detalaj informoj oni skribu al:

Esperanto-amikoj en la Germana Kulturligo, GDR 701 Leipzig,  
Käthe-Kollwitz-Strato 115.

## Longa lando, longa vojo

de Hidejuki Sakaeda

Estas tre amuze rigardi la mapon de la mondo kaj imagi tiujn ne konatajn landojn. Tiu sonĝo realigis al mi viziti en septembro Norvegujon. Mi ricevis biletojn el Oslo, kaj mi kiel kutime komencis rigardi la landmapon de Norvegujo. Mi ĝemis supozante la longan vojon, kiun mi devos iri. Ĉar mi jam ĉi-somere vojaĝis sufiĉe longan vojon kaj eĉ unu monaton forestis de mia loĝejo en Kopenhago.

Sed jen mi ekveturis vesperon la 30an de aŭgusto trajne al Oslo. Tiu vojaĝo estus monotona se mi ne alparolus al iu kunvojaĝantomaljunulo, kiu estis en la proksima kupeo. Ni komencis babili angle. Li subite demandis ĉu mi parolas esperanton. Jes. Kaj montriĝis ke li estas tre eminenta esperantisto de la komenco de nia jarcento, homo kiu konas Zamenhof! En Oslo ĉe stacidomo ni kaj s.ro Støp-Bowitz kiu atendis min tie kompreneble havis ĝojan tempon.

Longa lando, longa vojo kuŝas antaŭ mi. La unua loko kie mi haltis, estis Løten. Vilaĝo en montaro. S.ro Krogstie afable plenumis aranĝojn, mi ĉi tie kore dankas. La vojo norden estis ĉe la komenco. Trapasis Trondheim kaj prelegis en Mo i Rana. La naturo min impresis forte, la sovaĝaj rok-montoj kun disĵetitaj neĝpecoj, fluetoj rekte de supro al maro kiel blankaj serpentoj. Jen la scenejoj de nordaj mitoj, kiujn mi iam legis en Japanujo. Mi komencis senĉese pentri la pejzaĝojn sur pentraperojn (kiujn aĉe mi povis elvendi tuton en iu urbo en Svedujo). Skandalo devus okazi en Mo. Ĉar mi vekiĝis tro malfrue por kapti la trajnon al Bodø, dek minutojn antaŭ la forveturo! Malbenita vekhorloĝo! Sed sukcesis enirigi min en trajnon. Vizitis Bodø kaj de tie per

ŝipo mi daŭrigis vojaĝon al Harstad.

Afablaj esperantistoj bone akceptis min, eble la unuan junan japanan esperantiston en Harstad. Mi ĉie flaris malbonan odoron kaj poste eksciis ke tio venas de fabrikoj por haringa oleo! Terura odoro!

Ankoraŭ ŝipe vojaĝis al la plej norda loko en mia vojaĝo, Tromsø. Montoj estas jam blankaj, ĉi tie eĉ aŭtuno jam forpasis. En Tromsø mi prelegis en lernejoj. Mi ĝojis ke lernantoj multe demandis al mi post mia prelego. — Amuzaj gajaj esperantistoj akompanis min al la busstacio de kie mi forlasis nordan regionon suden. — La meznokta aŭtobuso kuris kun tri, kvar pasaĝeroj. Stela nokto kaj sendorma... Matene antingis Narvik, kie mi devis atendi kvarhorojn la trajnon al Svedujo. Sed tiu longa tempo estis duonigita de la apero de iu loka esperantisto kiu hazarde trovis mian insignon (Dankon pro prunto, s.ro Krogstie!) kaj alparolis al mi en la stacidomo. Ekstere iras ŝarĝvagonoj kun mineraloj. Kaj mi forlasis Narvik al Stockholm en agrabla trajno. Ĉielo bluis, kaj kampoj kun flavaj, ruĝaj, verdaj arbaroj flugis adiaŭante....

Fakte estas tre malfacile teni esperanto-movadon en tiel malproksimaj partoj de la lando. Homoj ne havas ĉiutagan tuŝon kun aliaj regionoj de la mondo. Tie ankaŭ preskaŭ ne troviĝas juna generacio de esperanto, ilia ŝato estas pli simpla - - Popmuziko! Veteranoj ankaŭ perdas sian scion pri esperanto, vivas en alia sfero de vivo. «Veteranoj ne mortas sed malaperos.» La solvon de problemoj mi ne povas projekti, sed ni devas ion fari. Ĉar lingvo kaj ideo esperanto ne estas destinita al nur grandaj urboj de la mondo, ĝi male devas servi por la tuta mondparto. Same kiel meznokta suno ĝi lumiĝas la teron senĉese kaj brile, nia ideo restas klara eĉ en la meznokto de la mondo, la vivo...

## La internaciaj feriaj Esperantokursoj en Helsingør

La internacia altlernejo en Helsingør situas nur dudek minutojn piede de la fervojstacio kaj la pramŝiphaveno de la urbo. La urbparto tamen estas trankvila kaj belega, kaj la lernejo estas ĉirkaŭita de granda, bela parko. Ĝus nun ĝi pligrandiĝas kaj plimoderniĝas. Grandaj, novaj domoj estas konstruitaj kaj konstruataj. Manĝhalo kaj sidsalono jam estas pretaj kaj la konstruo de granda, nova domo enhavanta loĝĉambrojn kaj aŭditoriojn finiĝis la pasintan aŭtunon. Tiam ankaŭ malaperas la tielnomata «ruĝa domo» kaj el la malnovaj domoj de la lernejo restos nur la belega ĉefdomo kaj pordista dometo. La partoprenantoj de la venontsomeraĵ feriaj kursoj alivorte trovos preskaŭ tute novan, modernan kaj pli komfortan, sed ankoraŭ tre ĉarman kaj idilie situantan lernejon. La plej granda parto de la parko estas zorge konservita kaj formas belan kadron ĉirkaŭ la impona stablaĵo.

La feriajn kursojn, kiuj ĉi-tiun someron aranĝiĝis inter la 17a kaj la 24a de julio, partoprenis 75 kursanoj el 8 landoj. La programo kiel ĉiam estis tre varia kaj enhavriĉa.

La antaŭtagmezaĵ horoj estis dediĉitaj al instruado. S.ro Søggaard-Hansen, la prezidanto de Dana Esperantista Ligo, lerte gvidis la elementan kurson laŭ la metodo de Friis (la naturmetodo). F.ino Gudrun Riisberg bonege plenumis la malfacilan taskon transpreni la gvidadon de la konversacia kurso post Ida Christensen (Adi), la verkistino de la fama libro «La forto de la vero», kiu mortis antaŭ kelkaj monatoj. Dum jardekoj f.ino Christensen gvidis ĉi-tiun kurson tiel brile, ke ĉiuj partoprenantoj por ĉiam memoros

la horojn sub ŝia katedro. Gvidanto de la perfektiga kurso estis s.ro Moravec el Germanujo. Lia sprita kaj instiga instrumetodo vere plaĉis al liaj lernantoj.

Posttagmeze aranĝiĝis interesaj ekskursoj. Ni i. a. vizitis la svedan najbaran urbon Hålsingborg, kie ni vidis la interesan vitrofarejon Hyllinge apud la urbo. Tie ni ankaŭ partoprenis kunvenon de la loka Esperantoklubo kaj travivis kune kun svedaj samideanoj neforgeseblan vesperon.

La fama kastelo Kronborg ĉe Øresund, la somera loĝejo de la dana reĝa familio, Fredensborg, kaj la danacia muzeo en la malnova kastelo Frederiksberg estis celoj de aliaj interesaj ekskursoj. La brila somera vetero tenis multajn el la partoprenantoj al banado en la freŝa, sala akvo de Øresund.

Vespere okazis film- kaj lumbildprezentadoj, prelegoj k.t.p. S.ro Friis montrante filmojn rakontis pri la kursoj en Helsingør kaj Vejle kaj pri siaj travivaĵoj dum sia vizito en Islando. S-ro Thomson el Bradford montris bildserion de Britujo, kaj s.ro Moravec interese prelegis pri Esperanto en la hejmo. La adiaŭan programon la kursanoj mem prizorgis sub lerta gvidado de f.ino Riisberg.

Ne estas eble raportoj pri la kursoj en Helsingør, sen aparte mencii la ĉefan personon, s-ron Friis mem. Ĉie li ĉeestas, ĉion li ordigas, al ĉiuj li havas amikajn vortojn. Dum la tuta semajno li estas la centra punkto. Per siaj ridetoj kaj sia ĉarma personeco li kreas vere unikan atmosferon de komprenemo kaj harmonio.

La altlernejo ĝis nun ne instruis Esperanton en siaj ordinaraj vintraj kursoj. La rektoro de la altlernejo en sia saluto al la kursanoj bedaŭris tion. Li asertis, ke la kaŭzo tute ne estis, ke li aŭ la estraro de la lernejo kontraŭagis Esperanton. La kaŭzo

simple estis, ke ĝis nun ne estis eble trovi kompetentan instruiston. Li ankaŭ ripetis antaŭe donitan oferton, ke junulo, kiu kapablas instrui Esperanton, povas partopreni la ordinaran kurson de la lernejo kaj samtempe funkcii kiel Esperantoinstruisto. Por la instruado li ricevos ordinaran salajron kiel pohora instruisto. Tio signifas ke li preskaŭ senkoste povas studi ĉe la lernejo. Ĉu tio ne estas oferto alloga por niaj junaj norvegaj Esperantistoj?

Nur tri norvegoj partoprenis la ĉi-jaran kurson. Bedaŭrinde estas, ke tro malmultaj norvegaj Esperantistoj uzas la okazon ĉeesti ĉi-tiujn kursojn. Estas por Esperantistoj neforgesebla travivaĵo sperti la nedefineblan senton de harmonio kaj kredo je la komuna ideo, kiu regas inter la partoprenantoj. Tiu spronanta atmosfero donas al la ĉeestantoj novan inspiron kaj instigon kaj plifortigas ilian kredon je la taŭgeco kaj la neceso de Esperanto. Tion ni preskaŭ ĉiuj bezonas. Tial mi esperas ke venonte pli da norvegoj trovos la vojon al la someraj kursoj en Helsingør, kaj ankaŭ al la aŭtunaj, kiujn aranĝas s-ro Friis en Aarhus.

*Per Engen, Elverum*

## La internaciaj aŭtunferiaj Esperantokursoj en Århus

16.—23. oktobro 1966

Estas nerefutebla fakto ke la mondo de jaro al jaro malvastiĝas, ke la komunikado inter la landoj pli kaj pli vigliĝas, ne nur en diplomata aktiveco kaj komerco, sed dank' al la vivnivela altiĝo en ĉiam plura landoj, la turismo kreskas, kaj per tio la kontaktoj inter ordinaraj homoj.

Estas tre strange ke en tia epoko kiel la nuna, kun kreskanta internacia

kontakto, ke la plej grava problemoj de la internacia medio, nome la lingva, ne tuŝas la plimulton de la homaro, kaj sekve restas nesolvita. Tro ofte oni spertas pri internaciaj kunvenoj, ke regas plena haoso pro manko da komuna lingvo.

Oni povas sin demandi: Kiam la mondo estos sufiĉe matura por elektisian lingvan denominatoron?

Ni esperantistoj havas la komunan lingvon tute preta, kaj tre volonte ni oferas ĝin al la homaro.

Estas bedaŭrinde ke la laboro por Esperanto nur estas libervola afero, farita de oferemaj idealistoj, kiuj spite de moko kaj antaŭjuĝoj faras ĉion eblan por la venko de sia afero.

Unu el tiuj fervoraj homoj kiuj tre multe faras por la venko de Esperanto, estas instruisto L. Friis en Åbyhøj en Danlando. Kune kun siaj agrablaj geinstruistoj, li fondis solidan tradicion, nome la unusemajnajn ferio-kursojn, — somere en Helsingør, kaj aŭtune en Jylland.

Ĉiaŭtune ĝi unuafoje okazis en la altlernejo de junaj hejmoj en Skåde pr. Højbjerg apud Århus.

Nur kelkaj vortoj pri la lernejo kie ĉijare okazis la aŭtuna kurso: Ĝi estas tute moderna kaj agrabla — jes eĉ luksa, ĝi estas fondita sur fundamento de kristana etiko, kaj enveninte oni tuj sentas sin en la hela humanista atmosfero de la dana teologo, himnoverkisto kaj elstara popolaltlerneja pedagogo Grundtvig, kiu diris: «Unuavice vi estu homo — poste kristano.»

En la aŭtunaj kursoj ĉijare partoprenis 61 el 5 landoj, nome el Britujo, Germanujo, Danlando, Svedujo kaj Norvegujo. En la daŭro de dimanĉo la 16an de oktobro la gepartoprenantoj alvenis. Okazis agrabla akcepto en la sidĉambro, kaj interkonatiĝa vespero en la festhalo, kie s.ro Friis bonven-salutis, kaj fine oni kantis starante «La Espero»n.

Lunde komenciĝis la instruado: Kiel kutime, estis tri kursoj, — unu por komencantoj laŭ la speciala instrumetodo de instruisto Friis, ĝin gvidis instruisto Søgård-Hansen. Kurson por konversacio gvidis f.ino Riisberg, kaj s.ro Moravec gvidis perfektigan kurson. Tiuj kiuj mem deziras fariĝi instruistoj laŭ la metodo de Friis, sekvis la instruadon de s.ro Søgård-Hansen al la komencantoj.

La ĉiutaga programo komenciĝis je h. 8.00 matene kun matenmanĝo, kaj je h. 8.45 ĝis 11.45 okazis la instruado. Je h. 12.00 estis la lunĉo, kiu ĉiutage estis ege abunda, kun tre bongusta manĝaĵo — tipe dana!

Post la lunĉo okazis ĉiutage diversaj distraj programoj. — Unu tago estis aŭtobusa rondeskurso al la Århusaj vidindaĵoj, nome al la universitato, al la katedralo kaj al la urbdomo. Alia tago estis arbarpromenado al la idilia Skovmøllen, kie oni trinkis kafon. — Estis ankaŭ vizitoj al la urba biblioteko, por rigardi la ampleksan fakon por Esperantoliteraturo, kaj al la Malnova Urbo. En la grandmagazeno Salling atendis abundaj tabloj, plenaj je kukoj kaj kafo, same en la viandkonservejo «Jako» en la antaŭurbo Brabrand, dum vizitoj tie.

Je h. 18.00 okazis vespermanĝo, kaj poste la vesperprogramoj.

Unu vespero s.ro Friis montris filmon pri Danlando, kaj alian pri Islando. Per Johan Krogstie montris lumbildserion «Vojaĝo tra Norvegujo», kune kun prelego pri la lando, kaj sekvis disdonado de esprantlingvaj broŝuroj eldonitaj de Norvega Ŝtata Fervojo. La esperantistoj de Århus vizitis la lernejon, kaj ili faris sian distran programon. — Unu vespero grupo da KELI-anoj faris diservon, kaj dum alia fojo prelegis s.ro Murphy pri la Universala Kongreso en Budapeŝto — kune kun lumbildoj. S.ro Murphy ankaŭ montris belegajn lumbildojn pri

ARNULF ØVERLAND:

## Tridek taleroj

Iam staris muelejo en ĉi tiu deklivo, tuj malsupre de Horn-lago. La viro, kiu posedis ĝin, forvojaĝis, kaj neniun venis post li, tial ĝi restis nelogata dum longa tempo. Fine ĝi kadukiĝis kaj estis prenita de la torento. Tio okazis en la sama jaro, kiam ĉi tie estis reparceligo; estas jam antaŭ longe.

Kaj la lasta, kiu estis ekzekutita en ĉi tiu distrikto, estis la bienservisto de la gastejestro ĉe Stokmo.

Tiu muelisto dungis malriĉan knabon por havi kiel helpanton en la muelejo. Li nomiĝis Hans kaj estis origine fremdulo. Li ne longe restis tie ĉi, ĉar li malaperis. Sed la stranga afero estis, ke li havis sonĝon, kaj kiel li sonĝis, tiel ankaŭ okazis; laŭ tio, kion oni diras.

Estis malbela afero. Oni parolis pri ĝi multajn jarojn poste, kaj tio estis la kaŭzo, ke la muelisto devis forvojaĝi. Li ne plu povis resti ĉi tie.

Kuŝas marĉo en la paŝtejo de Suda Stokmo, ĉirkaŭ duonvoje ĝis la urbo, kaj tie plurajn fojojn li provis dronigi sin. Fine oni devis perforte deteni lin; ĉar li pensis, ke li iel kulpas pri

vojaĝo tra la mondo pere de Esperanto, kaj neforgeseblaj estas la lertaj geaktoroj kiu ofte amuzigis nin per skeĉoj. — Kelkfoje oni ankaŭ rajtis danci en la festhalo. — Dum la lasta vespero estis finfesto kun paroladoj. Precipe menciinda estas la enversigitaj dankvortoj de la germana doktoro Fritzsche, direktitaj al la lernejo.

Kaj interkonsente kun li, mi konkludas la referaton, menciante la finon de ĉiu verso, ke la honoro kaj merito por la bonsukceso: «estis — estas — estos al Friis.»

*Per Johan Krogstie.*

tio, kio okazis. Li tiom bedaŭris, ke li batis la knabon en la lasta tago, kvankam tio ja estis necesa, se tia malriĉa knabo lernu prizorgi la muelilon kaj konduki kiel kristana homo.

En la tago, kiam tio okazis, la knabo certe dormis tro longe, ĉar la muelisto mem devis supreniri por vekti lin, kaj kiam li venis malsupren por matenmanĝi, li estis tiom konfuzita kaj konsternita, ke li faris ĉion malĝuste, kaj apenaŭ altabliginte, li formetis la kuleron kaj ne volis manĝi.

— Se vi malŝatas la manĝaĵon, vi iru sen ĝi, diris la muelisto. — Vi iru al la urbo, hodiaŭ, kun tridek taleroj al la komercisto. Nun rapide finu!

Jen li eltiris la monon el la kesto kaj metis ĝin sur la tablon. Sed la knabo nur sidis fikse rigardante la monon, nek movante sin, nek dirante eĉ unu vorton.

Tiam la majstro ekstaris kaj kaptis lin je la ŝultro.

— Ĉu mi ne povas ne fari tion? petis la knabo.

— Ne fari? — Ne fari vian devon? Ĉu vi estas freneza? Aŭ ĉu vi estas malsana?

— Ne, sed mi sonĝis — mi sonĝis, ke mi devis iri al la urbo kun tridek taleroj, kaj tiam vi venis kun ili, kaj poste vi ekkoleris, kaj jen vi prenis la bastonon, kaj —

— Tiam vi sonĝis la veron, diris la viro kaj prenis la bastonon, kaj li uzis ĝin longe kaj forte.

— Mi volas iri, mi iros, iros! kriis la knabo. Tiam li plukis la monon kaj eliris.

Vi povas imagi kiel li sentis sin, venante sur la vojon: Li estis tute konsternita kaj blindigita de ploro, tiel li kuris — tute konfuzita pro tio, kion li scias ke okazos, kaj kio ne

estas evitebla — tiel li kuris, la rektan vojon renkonten al ĝi, kaj kun la argentaj moneroj tintantaj en la poŝo.

Ankaŭ tiun li sonĝis, ke li kuris tiel, ke la moneroj tintis! — Kaj la vojo etendiĝis rekte antaŭen kun malsekeca herbo kaj marĉetoj ambaŭflanke kun aretoj da piceoj tie kaj tie. Kaj eĉ ne unu domon li povis vidi, kaj eĉ ne unu homon, kiu povus helpi.

Reen li ne povis iri, tiam la majstro batus lin ankoraŭ pli kaj forsendus lin denove. Kaj se li volus iri ekster la vojo, tiam li povus veni inter la arbojn — kaj tie, en la mallumo sub granda piceo kun pendantaj branĉoj, tie starus viro klinante sin super li kaj grimacus kun flavaj dentoj — kaj tie la sonĝo finiĝis!

Jen li eble pensis, ke Dio helpu lin; la bona, kara Dio igu lin trovi alian vojon! — Kaj tion li faris! Jen vojo, kiu turnis maldekstren, estis la vojo al Stokmo.

Estis unu granda, ruĝe pentrita loĝdomo kun du etaĝoj kaj unu malpli granda apude, kaj provizdomo kaj stalo vidalvide. Li rekonis ĉion! Ĉi tiun vojon li ne iru, precize ĉi tie li ne iru!

Li estis turnonta sin por kuri reen, sed jen staris la gastejestro mem, maljuna viro, nudkapa kaj kun granda, arĝentgriza barbo.

— Hans, ĉe la muelisto, diris la knabo. — Mi estas survoje al la urbo kun tridek taleroj al la komercisto. Sed iu sekvas min kaj volas preni de mi la monon, kaj li prenos min kun si sub grandan piceon —

— Ĉu iu sekvas vin?

— Jes!

— Kie do?

— Tie ĉi sur la vojo!

La gastejestro rigardis malsupren la deklivon kaj ridetis: — Kaj poste li prenos vin kun si sub grandan piceon, ĉu?

— Jes!

— Mi kredas, ke vi iras songante dum plenhela tago, diris la gastejestro kaj skuis la barbon.

— Ne, sed mi vere sonĝis! diris la knabo. — Mi sonĝis ankaŭ pri vi, kaj ke vi havas grandan, blankan barbon kaj skuas la kapon!

— Lasu ke mi rigardu vin! diris la gastejestro. — Ĉu via nomo estas Hans?

— Jes. Ĉu vi ne povas akompani min al la urbo?

— Akompani vin al la urbo? Ne, tion mi ne povas.

— Ĉu ne iu povas akompani min? Ne lasu min iri sola! Mi jam ŝparis kvar ŝilingojn, estas mia propra mono, kaj tiu, kiu volas akompani min, povas ricevi ĝin.

Sed tuj kiam li diris tion, li sciis, ke tio estas malĝusta. Li aŭdis la vortojn kiel eĥon, ili kvazaŭ estis diritaj iam antaŭe, ĉio ĉi jam okazis antaŭe, kaj nun ĉio nepre okazos denove.

La gastejestro staris cerbumante dum momento. Jen li vokis kontraŭ la fojnejon: — Jakob!

Dume Jakob elvenis el la kuirejo kaj staris tuj malantaŭ ili.

— Jakob, diris la gastejestro, — jen bubeto survoje al la urbo kun tridek taleroj, kaj li ne kuraĝas iri sola kun tiom da mono. Vi akompanu lin.

— Volonte, diris Jakob.

La gastejestro poste rakontis, ke li tiam eksentis korpikon, ĉar kiam la knabo ekvidis Jakobon, li etendis al li sian kvarŝilingon, dirante ke li preferas iri sola, kaj jen li forkuris tiel rapide kiel li povis.

La knabo kuris, kaj li stumblis en siaj propraj piedoj, li surhavis tro grandajn ŝuojn, li falis kaj kuris ne rigardante antaŭ si. Kaj ju pli longe li kuris, des pli klare konsciis, ke ne restas al li longa vojo.

Li ricevis puŝeton sur la dorson:

— Hej! Kial vi tiel rapide kuras?

Certe ne tiom urĝas al vi. Vi iomete malrapidu, kaj mi akompanu vin. Vi ne devas flugi. — Ĉi tie ni iomete ripozu, ĉu ne?

Jakob prenis lian manon. Li faris neniun reziston. Il iris trans la voj-fosaĵon kaj kontraŭ areton da piceoj ĉe dekliveto. Malantaŭe kuŝis la marĉoj. Ili sidigis sin sub la granda piceo.

— Nun prenos mi vian monon, por ke vi ne bezonu porti ĝin, diris Jakob. La knabo provis kovri sian poŝon, sed vane.

— Lasu min teni la monon, pro Jesuo! li petis.

— Pro Jesuo? Haha! Ĉu estas vere, ke vi sonĝis tion? diris Jakob.

— Jes.

— Vi do ankaŭ sonĝis, ke ni du sidas ripozante sub ĉi tiu piceo, ĉu?

— Jes.

— Ĉu ankaŭ pri la marĉo tie?

— Jes.

— Kaj ankaŭ pri ĉi tiu tranĉilo? diris Jakob kaj grimacis kun flavaj dentoj en nigra kaj tordita vizaĝo. — Strange, knabo, ke vi tiel sonĝis la veron!

La postan tagon oni arestis Jakobon en gastejo en la urbo. Unue li fariĝis furioza kaj volis piki la gardiston per tranĉilo; sed post kiam oni metis lin en karceron kaj enkatenis lin, li kvietiĝis.

Li konfesis ĉion, kaj kiam la pastro venis al li, li konvertiĝis. Li estis ege konvertita kiam oni ekzekutis lin, tiel ke li povis veni en konsekritan teron.

Sed la knabon oni neniam trovis, kaj la pastro ja ne povis fari la ritan preĝon super marĉo, do tion oni ne povas scii — sed estas strange pensi pri tio.

Kaj la muelisto — li freneziĝis, oni devis forigi lin, kaj poste oni certe devis meti lin en la frenezalejon.

Trad.: Grupo Esperantista de Trondheim

HANS KRISTIANSEN:

## Instruista konsilantaro


Juĝo komencas.  
Vitroj brilantaj  
fulmas ĉe l' tablo.  
Hirtaj hartufoj  
vicas kun rondaj  
kalvaj kranioj.  
Meze rektoro  
frapas krajone:  
Jam estas tempo.  
Ĉio provita.  
Dubo do cedu  
por certo glacia.  
Juĝo nun falos.

Kaj jen pri Ole.  
«Ĉu stulta por vi?»  
«Jes, stulta por mi.»  
«Kaj same por mi.»  
«Jes, stulta kaj pigra  
kaj naŭza por mi.»  
Do bone. En ordo.  
NELAŬDINDE al li!  
Nigrorandon al li!  
Honton kaj malgloron,  
morton kaj inferon  
kaj ĉiun eblan  
diablaĵon al li,  
lin puŝu en koton!  
Ĉar ĉiam li estis  
inerta kaj pigra.  
Do tion li indas.  
Jes, tion li indas.

Ĉar tia la leĝo de l' vivo.

Sed jen pri Jens.  
«Nu, lerta por mi.»  
«Jes, same por mi.»  
«Jes, lerta, agema  
kaj plaĉa por mi.»  
Do Jens estas bona.  
Do bone. En ordo.  
Donu amase  
TRE BONE, LAŬDINDE!  
Blankorandon al li!

På  
norsk



Bonn informerer på Esperanto.

For et par år siden ble det i Vest-Tyskland utgitt en bok på Esperanto, «Faktoj pri Germanujo», som i tekst og bilder ga inngående orientering om Tyskland og tyske forhold. Den ble snart populær i utlandet, og det varte ikke lenge før det trengtes en ny utgave. Nå er det sendt ut en tredje, ajourført utgave. Dette er ikke det eneste eksempl på at tyske myndigheter ser muligheten for å nå en vid leserkrets ved informasjon på det internasjonale språket. Det illustrerte tidsskriftet Okcident-Germana Revuo som har kommet ut i seks år, bringer stadig allsidig vesttysk orientering.

Forbundsrepublikken har i flere år gitt støtte til ungdomsforbundet Germana Esperanto-Junularo, som arbeider for Esperanto blant tysk ungdom på politisk nøytralt grunnlag og som har gjort en rekke tiltak for å få i stand kontakt mellom tysk og utenlandsk ungdom. Ett av disse tiltakene er «Det Internasjonale Ungdomsseminar» i nyttårsuken hvert år, hvor ungdom fra alle land har anledning til å være med på meget gunstige

Metu silkbantono  
kaj kronono sur lin.  
Linu metu en vitro  
kaj hisu linu supren,  
ke ĉiuj vidu  
kia knabo li estas!  
Ĉar Jens estis ĉiam  
laborema kaj brava.  
Do tion li indas.  
Jes, tion li indas.  
Ĉar tia la leĝo de l' vivo.

Trad.: LKH

betingelser, og hvor det også har vært med ungdom fra Norge. I år holdes dette stevnet for tiende gang, denne gang i Münster.

Esperantohenvendelsen til FN

Etter at henvendelsen til FN om støtte for Esperanto, med underskrifter fra nesten en million enkeltpersoner og ca. 4000 organisasjoner med over 71 millioner medlemmer, var overrakt FN's sekretariat i New York 6. oktober, har det fortsatt å strømme inn underskrifter til fordel for henvendelsen til Universala Esperanto Asocio's hovedsete i Rotterdam. Under disse omstendigheter har verdensforbundet funnet at det er for tidlig å stanse innsamlingen av underskrifter, og den vil fortsette inntil videre.

I Norge kan forbund, foreninger og personer som vil støtte henvendelsen til FN, få eksemplarer av den fra Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo 1.

Dobbelt jubileum  
i Esperantoklubben i Oslo

Esperantoklubben i Oslo feiret 26. novbr. dobbelt jubileum. Den første Esperantoforening i Oslo ble stiftet for 60 år siden, i 1906, men var bare i virksomhet til 1910. I 1916 ble det stiftet en ny forening, som nå kan feire sine 50 år. — Gjennom de femti år har foreningen og dens medlemmer gjort seg sterkt gjeldende i norsk, nordisk og internasjonalt Esperantoarbeid. Styret i Norsk Esp.-Forbund har i stor utstrekning vært rekruttert fra klubben i Oslo, og medlemmer av klubben sitter med internasjonale verv, bl. a. i Esperantoakademiet og i verdensforbundets råd. — I 1952 stod klubben for arrangering av Verdenskongressen for Esperanto og i 1965 for Den 2. Nordiske Esperantokongress. Klubbens formann i jubileumsåret er John Berggreen.

## RECENZOJ

Rakontu, samideano. 70-p. libro, broŝ., kun 26 rakontoj de 24 famaj esperantistoj. — Dansk Esperanto-Forlag 1966.

Multaj esperantistoj travivis ion rakontindan dum sia esperantisma vivo. Dum vojaĝoj, dum korespondado ktp. Kaj al aliaj samideanoj tiaj rakontoj estas plaĉaj. Jen do la eldonejo petis al diverslandaj esperantistoj rakonti, kaj komitato elektis kaj redaktis la kolekton, kaj ni havas libreton kun pli-malpli naivaj rakontetoj, sen iuj literaturaj pretendoj. Kaj se oni akceptas la libron tia, ĝi estas bonvena, eble eĉ povas havi intereson al tiuj, kiuj poste studas la historion de la esperantismo.

La Literatura Komitato de SAT kontrolis la lingvon. Persone mi ne ŝatas la tro strekplenan desegnaĵon sur la ekstera kovrilo, sed tio estas demando de gusto.

Haro.

Francisco Cândido Xavier: Paŭlo kaj Stefano. 544-p. historia romano. Eldonis Federacio Esp. Brasileira.

Antaŭ kelkaj jaroj aperis historia romano «Antaŭ du mil jaroj», bonvole akceptata de la esperantista gazetaro. Nun tiu ĉi granda libro estas nova romano de la sama triopo: La spirito Emmanuel, kiu diktis la libron al la mediumo Xavier, kaj L. C. Porto Carreiro Neto, kiu tradukis la libron el la portugala.

Kiel la titolo indikas, la libro estas romano pri du el la centraj personoj de la unua kristanismo, la unua martiro Stefano, nur nemulte konata el la Biblio, kaj la apostolo Paŭlo. Stefano estas — laŭ la romano — judo el Grekujo, sklavigita de la romanoj, sed eskapinta. Li havis fratinton, kiu estis la fianĉino de la juna, fervora

fariseo Saŭlo. Tiel estiĝas anima konflikto kaj krizo post la mortigo de Stefano, al kiu, laŭ la libro, Saŭlo ne estis nur, kiel diras la Biblio, atestanto, sed la instiganto. La Biblio ŝajnigas, ke la martirigo de Stefano estis subita, nelaŭjura, mortigo, sed la libro rakontas, ke Saŭlo intence planis ĉion kaj ke ĉio okazis post leĝa juĝo. Ankaŭ aliel la libro flankeniĝas de la rakontoj de la Biblio: Ĝi ŝajnigas, ke Stefano estis la vera gvidanto de la eklezio de Jerusalemo, dum Petro estis nur malfortulo kaj senkuraĝulo, kiu faris bonan laboron kiel flegisto de malsanuloj, sed nenion pli. Stefano estis la predikanto, la vera apostolo.

Tiu tempo ĝis la konvertiĝo de Saŭlo estas priskribita per la duono de la libro, dum la apostolado ricevis nur modestan amplekson. Tamen la libro fariĝis dika. Tute certe la ekspertoj de mallongigoj, kiujn havas Readers Digest, povus el la brika libro fari miraklon. Mi mem emus mallongigi almenaŭ la unuan duonon. Kaj al la spirito Emmanuel mi emus rekti la demandon: Ĉu la Biblio aŭ vi rakontas la veron? Ĉu vi konsultis la apostolojn antaŭ ol verki? Vi ja havus la eblecon.

La lingvaĵo estas admirinda. Tamen: desapontiĝo = ? (paĝo 264). Sur paĝo 287: «Jesuo, kiu ĉion povas en ĉi tiu mondo sub la egido de la Patro...». Egido estas la ŝildo de la greka diino Palaso, kaj tial signifas ankaŭ ŝirmon, protekton. Kial uzi la esprimon el la paganismo por priskribi la kombinon de Patro kaj Filo? Min ĝenas la ĉiama «la Kristo», sed eble nur ĉar mi estas norvego. «Kristusen» estus neblaĵo. Kaj ankaŭ la tro ofta partigo de vortoj tiel: «efe-ktivaj» estas ĝena kaj ne-neceza en presita libro.

Kun tiuj riproĉoj mi tamen povas rekomendi la libron al ĉiuj, kiuj ŝatas historiajn romanojn.

H.A.R.

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

*Al tiuj, kiuj ne estas individuaj membroj de U.E.A.*

Vi scias, ke, estante membro de landa Esperanto-organizaĵo aliĝinta al U.E.A., vi estas membro de U.E.A. Tio signifas, ke vi apartenas kaj subtenas la mondan Esperanto-movadon. Pro tiu via membreco vi havas la rajton uzi la servojn de la delegitoj de U.E.A. Vi povas skribe peti informon el iu ajn eksterlanda urbo, kaj la delegito tie estas devigata respondi al vi. Ankaŭ survoje en eksterlando vi povas, ĉu buŝe, ĉu telefone, peti informojn de delegito, kaj tiu volonte donas ilin. Kion signifas tiu ebleco, mi la subskribinto ofte spertis.

Sed por uzi la servojn de delegito vi devas pruntepreni jarlibron de UEA de iu, kiu estas individua membro de U.E.A., ĉar vi, kiu nur pere de la landa organizaĵo estas membro de U.E.A., ne havas tiun jarlibron kun la nomoj kaj adresoj de delegitoj.

En la landa Esperanto-gazeto vi certe povas legi iom pri la internacia Esperanto-movado kaj la internaciaj agadoj kaj okazintaĵoj, sed la landa gazeto kompreneble nur parte povas enhavi ilin. Se vi vere deziras eluzi la eblecojn, kiujn vi kiel sciinto de la Internacia Lingvo Esperanto havas, necesas, ke vi abonu la revuon «Esperanto» kaj havu la jarlibron de U.E.A. Tio signifas, ke vi devas fariĝi membroabonanto (MA) de U.E.A.

En 1967 la kotizo por MA de UEA nur sendu tiun monon al la ĉefdelegito, kiu estas s-ro Alfred Skyberg, kaj kies poŝtkonto estas 133.29.

Ĉiuj estraranoj de UEA ĝojos pri via aliĝo kiel individua membro, kaj mi, estrarano de U.E.A. pri financoj, ankoraŭ iom pli, ĉar estas klare, ke preso de ekzemple 1000 pliaj jarlibroj

kaj 1000 pliaj ekzempleroj de la revuo ne multe plialtigos la elspezojn de U.E.A., kaj ke do per pli da individuaj membroj U.E.A. povas solvi siajn financajn problemojn.

Leganto de tiu ĉi artikolo, mi vin antaŭe bonvenigas kiel individua membro de U.E.A.!

E. J. Woessink,  
estrarano pri financoj de U.E.A.

## Sukcesa laborkonferenco de IOE

Inter la 25a kaj 29a de julio okazis en Prago la Unua Laborkonferenco de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE). La aranĝojn ĉeestis meznombro kvindek da personoj. — Oni diskutis ĉefe pri la metodoj por enkonduki Esperanton en la diversaj kampoj de internacia aktiveco. Estas decidite plifortigi la kampanjojn en turismo kaj en sporto, kaj iniciati similajn agadojn inter pluraj sociaj organizoj kaj en kelkaj sciencoj, kiel ankaŭ, ligite al tio, en pluraj internaciaj kongresoj kaj konferencoj.

La reto de kunlaborantoj, kiu jam superas 300, rapide pligrandiĝas. Kunlaboro estas jam starigita kun deko da lokaj societoj, du landaj kaj du regionaj komitatoj kaj tri fakaj asocioj. Ili ĉiuj akceptis uzi la kampanjan metodon por pli rapida enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon.

Por apogi la kampanjon en turismo, IOE decidis fondi komercan entreprenon Esperanto-Turismo. Dum la venonta somero okazos IOE-seminario por prepari profesiajn kaj amatorajn laborantojn por la realigo de la komunaj celoj. Estas rekomendita la disvastigo de la moderna aŭdvida struktura metodo, kaj pli vasta diskonigo de «vojaĝpremiaj kursoj».

**52-a UK de Esperanto**

TEL AVIV, 2.—9. aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Ŝolar, Ŝtat-prezidanto de Israelo.

**KONGRESAJ DATOJ**

Ni atentigas ke, pro specialaj lokaj cirkonstancoj, la 52-a U.K. ne okazos, kiel la ĝisnunaj Universalaj Kongresoj, de sabato al sabato, sed ĝi okazos de merkredo al merkredo.

**LIMDATO**

Ni ankoraŭfoje atentigas ke la aliĝoj por la 52-a U.K. estas akceptataj ĝis la 22-a de junio. La limdato indikita sur la aliĝiloj (30/6 1967) estas sekve nevalida.

**DUA BULTENO**

En la mezo de januaro 1967 estas antaŭvidata la apero de la Dua Bulteno, en kiu troviĝos i. a. precizaj informoj pri la loĝadebleco en Tel Aviv kaj pri la kongresaj ekskursoj. Ĝis la apero de la Dua Bulteno la aliĝintoj bonvolu ne skribi al la Kongreso pri tiuj temoj.

**GLUMARKO**

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de U.E.A. bela kolora glumarko eldonita okaze de la 52-a UK. Prezo: 0,50 ned.gld. (2,- st.) por 10-glumarka folio.

**STATISTIKO**

(je 3/11-66). Arg. 1, Aŭstral. 3, Aŭstr. 3, Belg. 7, Braz. 2, Brit. 15, Bulg. 26, Ĉeĥosl. 16, Danl. 2, Finn. 3, Franc. 47, Germ. 9, Hisp. 2, Hongkongo 1, Hung. 35, Isrl. 17, Ital. 12, Jap. 3, Jug. 19, Kan. 1, Monako 3, Ned. 18, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Poll. 82, Port. 2, Rum. 1, Sovet. 1, Sved. 17, Svis. 3, Usono 8, Ven. 1. — Entute 364 el 32 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

**Norvega Kroniko**

Red.: Karsten Langsholt

**Klubo Esperantista en Oslo.**

6/10. Post bonvenigaj vortoj, la prez. John Berggreen interalie menciis ke Otto Prytz ekhavis bonan ideon, nome ke oni sonbendigu la Kluban Bultenon por cirkulado inter la blindaj membroj, kio jam realiĝis.

Du kursoj por komencantoj komenciĝis kaj ankaŭ studrondo en Aars & Voss lernejo vendredojn je la 18.30 h. La ĉefpunkto de la programo estis raporto de Otto Prytz pri la Junulara Kongreso en Pecs. Partoprenis pli ol 900 junuloj el 22 landoj — rekorda nombro — el ili 400 poloj. El Norvego nur 2 partoprenis: Otto Prytz kaj Gunleik Bergrud. La Junulara Kongreso de la multaj programŝanĝoj; la sed pro multa pluvo kaj ĉar multaj el la aranĝoj estis planitaj en liberaeraj lokoj, okazis multaj ŝanĝoj, tiel ke oni ofte ne sciis kie kio okazis kaj kiam. Li konkludis ke estis la kongreso d ela multaj programŝanĝoj; la ŝafaron ili ne povis bone direkti; estis sufiĉe da distraĵ sed ne sufiĉe multaj seriozaj aranĝoj; da poloj kaj politiko estis sufiĉe.

Asbjørn Syslak ludis per piano opretmelodiojn de Franz Lehar — tre ege bele kaj elegante. — Fine John Berggreen legis anonime ensenditan artikoleon: «Ski-irado kaj filozofio» — tre amuza.

Dum la kafopaŭzo ĉi tiun fojon ni sidis ĉe longa komuna tablo — kaj ŝajnis ke tio estas populara, ĉar oni vigle babilis, kaj vigle kantis: «Pasero en la korto», «La fluanta tajdo», «Tiritomba», «Bonan nokton». Brynhild Østmo estris la kantadon.

17/10. Granda ĝojo estis revidi kelkajn esperantistojn, kiuj bedaŭrinde nur malofte havas okazon ĉeesti niajn kunvenojn. Harda Danielsen rakontis pri la kongresvojaĝo, kiun ŝi faris kune kun Karen Berge, Sauda, kaj Brynhild Østmo, Aslaug Refsing kaj Birgit Norman el Oslo, laŭ la plano de Turisma Servo de N.E.L. Estis trisemajna vojaĝo, kiu inkluzivis restadon en Salzburg kaj Klosterneuburg ĉe Wien, partoprenon en la U.K. en Budapeŝt kaj en postkongreso en Szeged. Ŝi montris belegajn lumbildojn pri Salzburg kaj Klosterneuburg. En la lasta pitoreska urbeto okazis esperantoaranĝo en kiu partoprenis proks. 90 personoj el 12 landoj, interalie el Usono kaj Japanujo. La aranĝo estis granda sukceso. Inter la programoj estas menciindaj interalie akcepto en la urbodomo, tuttaga aŭtobusekskurso kaj ekskurso al Wien kun vizito en la Esperanto Muzeo.

Dum la dekminta lingvoinstruado klarigis John Berggreen pri la korelativoj. — Rolf Bugge-Paulsen donis informojn pri la okazonta Unesko-konferenco kaj pri la propono, kiun prezentos la 5 nordaj delegacioj tie.

**«La Urso», Sarpsborg,**

Post la kutima instrua horo por la komencantoj ni dediĉis la kunvenon al UNESCO, okaze de ties 20-jara jubileo. Tor Walberg faris koncizan kaj tre interesan prelegeton pri UNESCO kaj ties laboro. Kiel en la pasinta kunveno ni sendis salutleteron al UNO, ni nun sendis gratulan leteron al UNESCO, kaj ĉiuj ĉeestantoj subskribis.

**FESTO**

10/11. La Urso, kiu estis fondata post elementa kurso de D.ro A. Mildwurf, la 6an de novembro 1951, festis sian 15-jaran jubileon kiel gasto de gesinjoroj Birch Olsen, en ilia bela hejmo en Greåker. La prezidanto me-

morigis pri la unuaj tagoj de nia klubo, kaj bondeziris al la klubanoj. — Norvega Esperantista Ligo sendis gratulan leteron, kiu estis legata. Estis legataj ankaŭ leteroj de Klubo Esperantista en Oslo, kiu invitis reprezentanton de nia klubo al sia 50-jara jubileo, kaj de UNO, kiu dankis pro nia saluto. Ĉe la tablo sinjorino Sigrild Birch Olsen paroladis en la nomo de la klubanoj pri la kultura laboro de la prezidanto Rosbach, transdonante al li belan florbukedon. Fine Rosbach montris filmojn el Svedujo kaj Danujo, kaj Roald Birch Olsen montris filmon el Italujo.

**Kristiansands Esperantoklubb.**

6/10. La prez., Birger Reinertsen, gvidis la kunvenon. Sigurd Sørensen rakontis pri la kongreso en Budapeŝt. Beth Hveem agitadis varme por la kotizo, kaj baldaŭ la mono en ĉiuj koloroj venis al la monkasos de Beth. La monaro similis al tulipĝardeno. Spiras bela somera aero super la monkasos de Beth. — Poste ni ricevis manĝon, kaj sinjoro Dalland rakontis pri medicina miraklo. Poste Birger ludis per piano muzikon de Chopin.

**Sauda Esperantoklubb**

kunvenis 9/9 en Sauda Klubb. La prez. Johan Matland bonvenigis al nova sezono. — Li mem faris la ĉefpunkton de la programo: Prelego kaj lumbilda prezentado de vojaĝo al Hungarujo kaj la kongreso en Budapeŝt. Per desegnaĵoj kaj mapoj kaj belaj kolorbildoj li sukcesis viviĝi la veturon kaj la impresojn pri la kongreso por la interesitaj kunvenantoj. Estis vere altkvalita prelego.

Post la kafopaŭzo s.ino Karen Berge rakontis pri la antaŭkongreso kiun ŝi ĉeestis en Klosterneuburg. Fine s.ino Elna Matland intervjuis Normann Birkeli kaj Arthur Bjerke pri iliaj impresoj pri Hungarujo kaj la kon-



Ili kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn de filmaktoroj, kaj paperbuŝtukojn. — Skribu al Jolán Berhidi, Budapest XVII, Rákosliget VIII u. 6, Hungario.

greso en Budapeŝt. — La prez. dankis al la ĉeestantoj pro ilia intereso, kaj informis ke la klubo ekstartos du studrondojn, unu por novuloj kaj unu por progresintoj.

20-jara komencanto, studento de arkitekturo, deziras korespondi kun norvegaj gejunuloj, pri diversaj temoj. Zoltán Lépö, Budapest. VII. Ker. Vörösmarty u. 2. II/21. Hungarujo.

22/9. Kunveno okaze de la vizito de d.ro Aŝvinikumar el Hindujo. La membroj, kvankam ne multaj, kun granda atentemo aŭskultis al la prelegisto el la malproksima lando, estis por ni treege interese aŭdi pri la soci-aj ŝanĝoj en Hindujo nuntempe.

27-jara hungaro dez. kor. kun norvegaj samideanoj. — Tovölgyi János, Lenin ut. 23, Mosolmagyaróvár, Hung.

En la posta tago instruistino Elna Matland kunprenis la hindon al la gimnazio unue, kie li prelegis por la ĵurnalistoj poste al la ĵurnalistoj, kio gis por la ĵurnalistoj en la plej superaj klasoj tie. S.ino Matland interpretis la prelegojn.

### «Esperanto en komerco»

kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. — Prezo: g. m. 2,—; ekde 10 libroj g. m. 1,35.

#### ESPERANTO-RONDO

718 Crailsheim, Germanujo

3/11. La kunveno estis dediĉita al Unesco, kaj ĝia 20-jara ekzisto. Multaj samideanoj, kaj kelkaj novuloj (laŭ speciala invitilo alvokitaj) venis al la kunveno por aŭskulti al nia kluba prezidanto Johan Matland, kiu parolis pri la organizo Unesco kaj la lingvaj baroj en la hodiaŭa mondo. Li ankaŭ montris lumbildojn de la laborkampoj de Unesco, kiujn komentis Elna Matland,

### Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

### Esperantoforlaget A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

### Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

### La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.

Telefona: 54 7 27

Du el la partoprenantoj en la nova studrondo de la klubo, Ingrid Matland kaj Liv Bakke bele deklamis esperantajn poemojn. — Kafopaŭzo ankaŭ estis, kaj ni kantis novan esperantokanton, havigitan de la dana esperantokantlibro.

## Korespondu!

Gelernantoj 14—18 jaraĝaj deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo, sed precipe el nordaj landoj.